

SCIENCA REVUO de Internacia Scienca Asocio Esperantista BEOGRAD, Jugoslavio	El Vol. 23 n-ro 3 (95) 25.6.1971.
--------------------------------------------------------------------------------------	-----------------------------------------

CARA CENZURO KAJ ESPERANTO

/ DUA PARTO /

(S.K. Ĥvorostin, LENINGRADO, Sovetio)

La unua signo de cenzura liberaliĝo, ligita kun la maturiĝo de la rusa revolucio, estis rilato de la cenzuro al la fondo de Esperanta periodaĵo. La 10.2.1904. la kuracisto I.D. Ostrovskij petis permeson ĉe la Ĉefa administracio por presaferoj pri eldono en Peterburgo, sub sia redakcio, de la gazeto "Esperanto". Li plénpene konvinkadis la cenzuron pri utilo kaj sendanĝero de Esperanto, kiu ne atencas kontraŭ naciaj lingvoj kaj rapide disvastiĝas. Al la petskribo Ostrovskij aldonis 1/ franclingvan broŝuron de Kutira /Couturat/ "Pour la langue internationale", 2/ liston de partoprenantoj en la Delegacio por akcepto de helpa internacia lingvo, 3/ grandan liston de multnombraj organiziĝoj, kiuj subtenas la Delegacion, 4/ Deklaracion de la Delegacio pri kreo de artefarita internacia lingvo, en 5 lingvoj. En tre limigita programo de gazeto la eldonisto promesis tute ne tuŝi problemojn kaj sciigojn politikajn, politiko-ekonomiajn kaj religiajn. La petinto zorgeme pruvis sian lojalecon al carismo: li aldonis atestitan kopion de enketo /"formuljarnij spisok"/ pri konsisto de sia familio, sia klereco, socia tavolo, posedo de domo /havo de propraĵo/, rango, ricevitaj medaloj k.t.p. Li anticipe montris cenzuriston, en rango "efektiva ŝtata konsilanto"/"dejstvitelnij statskij sovetnik"/ Ljubi, kiu sciante Esperanton, konsentis senpage cenzuradi la gazeton.

La nova estro de la Ĉefa administracio por presaferoj N.A. Zverev demandis tavidan guberniestron /Ostrovskij konstante loĝis en Jalta/: "ĉu la petanto laŭ moralaj kvalitoj kaj socia situacio meritas ...rajton por eldono?" Post sekreta pozitiva respondo de la guberniestro, Zverev postulis recenzon de polico. Departemento de polico metis stampon: "mankas informoj pri Ostrovskij". Tio signifas ke polico scias neniun krimon de Ostrovskij. La ĉefa administracio por poŝto kaj telegrafo, kie oficis cenzuristo Ljubi, sciigis ke ĝi ne kontraŭstaras komisiu cenzuradon de la gazeto al Ljubi.

Rezulte de ĉi tiuj politikaj garantioj la 1.5.1904. la cenzuro "opinias la permeson ebla". La 26.5. Ostrovskij ricevis ateston /"svidetelstvo"/ pri rajto de eldono.

La 28.10.1904. Ostrovskij informis la Ĉefan administracion, ke Ljubi mortis kaj petis pri eldonado sen antaŭa cenzuro. Li promesis zorgeme eviti ĉiujn "krimajn" por registaro problemojn, doni rusan tradukon de Esperantaj tekstoj, ĉar li jam faris grandajn elspezojn kaj akiris abonantojn. Se ne estas eble permesi la eldonon sen antaŭa cenzuro, Ostrovskij petis komisiu cenzuradon al la cenzuristo Krivoŝ. Responde estis permesita cenzurado de Krivoŝ. Dum januaro-februaro 1905. eliris 3 duoblaj numeroj de "Esperanto".

Dum la revolucia jaro Ostrovskij kuraĝis denove peti pri liberigo de sia eldono de antaŭa cenzuro kaj pri transporto de la eldono de la gazeto el Peterburgo al Jalta. Li ricevis rifuzon de ambaŭ petoj.¹

De junio 1904. aperis novaj cenzuraj permesoj por Esperantaj eldonoj,² kaj ĉiujare de oktobro 1904. ĝis la 1917. raportoj kaj alfabetaj listoj de la eksterlanda cenzuro informas pri 5-40 cenzuritaj Esperantaj eldonoj /diverstitolaj/, el kiuj la plejparto estis permesata por enveturigo Rusion. La poŝta cenzuro de periodaĵoj ankaŭ ĉiujare tralasis por ruslandaj abonantoj Esperantajn ĵurnalojn kaj gazetojn.³

Oni permesis ankaŭ enlandajn eldonojn de libroj, apartajn versaĵojn. En la 1909. estis permesita Esperanta spektaklo kun deklamo.⁴

Pli rapide kaj facile, post unu monato /25.9.-25.10./ 1904. ricevis permeson eldoni gazeton "Kuracisto, internacia medicina revuo", kun tre modesta programo, doktoro A.I. Asnes el Peterburgo. Asnes ĉe sia petskribo aldonis "Ateston", de polica oficisto, ke li "estas tiu sama persono, kiel sin nomas, loĝas sur Sadovaja strato, d.63". La ĉefa cenzura administracio sekrete enketis pri li "Estraron de la Ĉefa kuracista inspektejo" kaj "Departementon de polico", kiuj ne malhelpis permesi la eldonon.⁵

Preskaŭ samtempe la societo "Espero" ricevis rajton eldoni en Peterburgo la gazeton "Ruslanda esperantisto". La petantoj aldonis statuton de la societo, atestojn pri personeco de eldonisto - prezidanto de "Espero" V.K. Rogaĉev-Antonov, kaj pri redaktoro - kuracisto A.I. Asnes. La cenzuro, post kontrolo de polico, permesis la eldonon, sed forstrekis el programo de la gazeto punktojn: "revuo de rusa gazetaro" kaj "kroniko". La 28.9.1905. la nova prezidanto de "Espero" profesoro A. Dombrovskij ricevis permeson transformi la gazeton el ĉiumonata en ĉiusemajnan.

Tiujn permesojn de la Ĉefa administracio por presaferoj konfirmadis la Ministerio por enlandaj aferoj. La Peterburga komitato de cenzuro plenumis formalizaĵojn por eldono.⁶

Dum jaroj de la Unua rusa revolucio pligrandiĝis nombro de Esperantaj eldonoj. Tion influis sukcesoj de Esperanta movado /en la 1905. okazis la unua tutmonda Esperanta kongreso/, ankaŭ iu malseverigo de la cenzuro, precipe dum tagoj de la Tutrusia oktobra striko. Post la manifesto "17. de

oktobro 1905." /malnovkalendare/ cenzuro estis parte paralizita. La carismo ne kapablis tuj reorganizi kontrolon super presaĵoj. La registaro estis devigita malseverigi karakteron de la kontrolo.

La 24.11.1905. /malnovkalendare/, postsekve de la manifesto "17. de oktobro, aperis "Provizoraj reguloj pri periodaj presaĵoj", kiuj estis metitaj en "Statuton de preso" de la Leĝkodo 1906.; ili estis ripetitaj en la Leĝkodo 1912. kaj ekzistis ĝis la revolucio 1917. Malvenko de la Unua rusa revolucio rimarkeble malbonigis situacion, sed kelkaj konkeroj de la revolucio restis en tiuj reguloj kaj en la praktiko.

En la reguloj de la 24.11.1905. oni diris pri "libero de preso", deklaris likvidon de anticipa cenzuro, de administraj punoj, pri financaj garantioj. La Ministerio por enlandaj aferoj jam ne rajtas malpermesi pri-trakton de problemoj de ŝtata graveco. Tamen por eldonoj, kiuj estas faritaj ekster urboj oni gardis la malnovan cenzuran ordon.

Por novaj eldonoj en urboj oni postulis formalajn informojn: loko, presejo, adresoj de eldonisto kaj redaktoro ktp. Redaktoro devas esti rusa ŝtatano, posedi "ĝeneralan civitanan rajtokapablecon", "ne konformi al kondiĉoj de la 7-a punkto de statuto pri elektoj por Ŝtata Dumo" /parlamento/, tio signifas ne esti senigita de la balota rajto. Por neruslingvaj eldonoj guberniestro aŭ urbestro devis dum 2-monata limtempo doni ateston por la rajto de eldono.

Sed tiuj, ĝenerale pli liberalaj, reguloj konservis por la registaro kontrolon super presaĵoj. Krpm militaj sekretoj programo kaj titolo ne povas havi "ion kontraŭ moralo kaj kriminalaj leĝoj". Ĉiun numeron de eldonaĵo oni necesas prezenti al la cenzuro. Jam presitaj ekzempleroj ebligas aresti la aŭtoron, redaktoron kaj eldoniston kaj submeti ilin al tribunalo. Juĝo decidas sorton de konfiskita eldono, oni povas neniigi ĝin, aŭ malpermesi daŭrigon de la eldono. Formalaj postuloj /indiko, redakto ktp. sur ĉiu numero, kaj aliaj / garantiis la kontrolon. 7

Konforme al tiuj reguloj estis permesitaj sekvantaj Esperantaj gazetoj:

En la 1907.- "Tutmonda kuriero", Peterburgo /D.777, r.8, d.306/
 En la 1908.- "Pola esperantisto", Varsovio /D.776, r.22, d.41/
 " - "Estlanda esperantisto", Revel /D.776, r.9, d.1402/
 " - "Ondo de Esperanto", Moskvo
 " - la gazeto "Espero", Peterburgo /D.777, r.13, d.533/
 En la 1909.- renovigita provizore haltigita "Ruslanda esperantisto"
 /D.777, r.14, d.419/
 " - "Voĉo de farmaciistoj", Varsovio
 En la 1910.- "Kaŭkaza esperantisto", Tifliso /D.776, r.21 parto 2, d.17/
 " - "Riga stelo", Riga
 " -- "Nerkarar"/"Kolorigisto"/, Baku /D.776, r.21 parto 2, d.190/
 " - "Stelo de Ukrainujo", Odeso /D.776, r.16 parto 2, d.1213/
 " - "Universala gazeto", Peterburgo /D.777, r.16, d.162/
 En la 1911.- "Bultenoj de Ruslanda Esperanta societo de kuracistoj",
 Moskvo /D.777, r.17, d.292/
 " - "Kovno-Esperanto", Kovno
 En la 1912.- "Volga stelo", Saratov d.385/
 " - "Memorskriboj de esperantisto", Peterburgo /D.776, r.18,

En la 1914.- "Patrina lernejo", Peterburgo /D.776,r.10,d.1356/

" - "Bulteno de Tomska societo esperantista, Tomsk

En la 1916.- "Verda radio", Petrogrado

" - "Informilo", Moskvo /D.776,r.17,d.255/

Tamen ĉe lokaj administracioj aperadis duboj pri ebleco permesi Esperantajn eldonojn. La barojn oni likvidis per klopodoj de la Ĉefa administracio por presafereoj laŭ la reguloj de la 24.11.1905.

La 27.6.1908. la Moskva komitato por presafereoj demandis la Ĉefan administracion: kiu devas cenzuradi la revuon "Ondo de Esperanto", ĉar en la moskva cenzuro mankas oficisto scianta Esperanton. Malgraŭ la ordono de la Ĉefa administracio trovi necesan cenzuriston, la Moskva cenzura komitato rifuzis al la petanto Saĥarov eldoni la revuon. Saĥarov, la 25.11.1908., plendis al la Ministerio por enlandaj aferoj, menciante la leĝon de la 24.11.1905. "Ĉu efektive", skribis Saĥarov, dum 2 legitimaj monatoj la moskva cenzuro ne preparis cenzuriston kiu povas cenzuradi Esperantan eldonon? "Ili ja ricevas salajron kaj devas fari tion". La plendo de Saĥarov, kiu havis rangon "nadvornij sovetnik", estis raportita al la ministro Stolipin. Laŭ la ordono de Stolipin la Ĉefa administracio postulis de la Moskva komitato urĝe trovi taŭgan cenzuriston kaj raportu kial ĝi ne plenumis la antaŭan ordonon. Samtempe la moskva urbestro estis sciigita, ke "foresto en iu momento de persono, scianta la lingvon de eldono, laŭ la ekzistanta leĝo ... ne donas bazon por rifuzi ... la rajton de eldono." Tiam la Moskva komitato raportis ke la cenzuristo Venkstern konsentis cenzuradi Esperantan eldonon kontraŭ aldona laborpago. La ordono ne estis ĝustatempe plenumita, ĉar personoj sciantaj Esperanton estas troveblaj nur en medio de la proksime starantoj al la eldono "Ondo de Esperanto", kio "ne estas taŭga por kontrolo de la revuo". La cenzura komitato komence turnis sin al profesoroj de la filologia fakto de la Moskva universitato. La "saĝuloj" respondis ke "ili opinias: Eksperanto /tiel!/ ne estas lingvo, sed ĉifro de specifa speco, kies studo ne povas esti branĉo de scienco por faka instruo".⁸

Ankaŭ la liflanda guberniestro demandis en la 1910: ĉu eblas permesi "Rigan stelon" kaj kiu kontrolos la gazeton? La Ĉefa administracio, menciante la leĝon de la 24.11.1905. ordonis trovi necesan cenzuriston laŭ elekto de guberniestro. Memkompreneble post ricevo de la ordono taŭga cenzuristo estis trovita.⁹

Simila dubo aperis ĉe la saratova guberniestro. En la 1912. li "petis sciigi: ĉu eblas permesi eldonojn en lingvoj, nomataj artefaritaj, ĉar kontrolo de tiuj eldonoj estas tre malfacila". La Ĉefa administracio demandis ĉe la saratova inspektoro por presafereoj: ĉu li povas mem kontroli "Volgan stelon", aŭ li konas iun personon kiu povas cenzuradi la gazeton? Kiam la inspektoro rifuzis trovi cenzuriston, la Ĉefa administracio skribis al la saratova guberniestro, ke lia opinio "ne povas malhelpi" la permeson laŭ la valida statuto por preso. Tiam la saratovaj administrantoj trovis taŭgan oficiston.¹⁰

En la 1914. la tomska guberniestro demandis: ĉu eblas komisi kontrolo de gazeto al la redaktoro, kiel petas prezidanto de la tomska Esperanta societo? Kvankam "malfavoraj je politika rilato faktoj" pri la redaktoro ne

ekzistis, la Ĉefa administracio ne permesis: "kunigo de la devoj de redaktoro kaj observanto estas nepermesebla, ĉar tia kunigo povus konduki al juĝa persekuto kontraŭ si mem ... La fakto de apero en Tomsk de esperantlingva eldono supozigas, ke tie estas personoj sciantaj tiun ĉi lingvon"¹¹

Eĉ en la 1916. la Ĉefa administracio estis devigita ĉesigi dubojn de lokaj administrantoj. La supera inspektoro por presejoj demandis: ĉu ekzistas baroj por eldoni revuon "Verda radio", kiun permesis la petrograda urbestro? La petrograda komitato por presaferoj ree informis pri foresto de cenzuristo scianta Esperanton. Sed la Ĉefa administracio respondis ke la inspektoro devas precize obei al la Statuto pri preso.¹²

Tamen suspekta rilato al Esperanto aperis kaj ebligis arbitrajn agojn en malgrandaj urboj. En la 1913. "koleĵskij sovetnik" /ne alta rango/ P. A. Popov intencis eldoni en la urbeto Armavir de la Kubana regiono "Bultenon de internacia lingvo". La ministro por enlandaj aferoj N. A. Maklakov "konfide" demandis grafon I. I. Voroncov-Daŝkov /cara komisiito, "namestnik", en Kaŭkazo/ pri la opinio, rilate la peton de Popov.

La birska polica estraro, kie konstante loĝis Popov, atestis lian plenrajtecon. En la stabo de la Kaŭkaza milita regiono /"voennij okrug"/ oni maltrankviliĝis: ĉu estis okazintaj permesoj de similaj petoj? Necese raporti pri la lingvo". Kvankam la estro /"nakaznoj ataman"/ de kaŭkazaj kazakoj opiniis ebla kontentigi la peton de Popov, tamen la estro de la Kubana regiono generalo-leŭtenanto proponis rifuzi, ĉar "Esperanto, aperinta en medio de socialistoj de ĉiuj landoj /!/ estos ... ilo por disvastigi malutilajn ideojn inter la loĝantaro".

La Ĉefa administracio konsentite kun Maklakov rifuzis la peton de Popov, sub kutima preteksto: "malfacileco ... de bezonata kontrolo en Armavir, pri lingvo komprenebla por malmultoj".¹³

Suspektoj kaj duboj ĉe lokaj administracioj ekzistis ankaŭ pri neperiodaj Esperantaj eldonoj. La urbestro de Rostov sur Don en la 1912. demandis la departementon de polico pri eldonoj, kiujn dissendis la moskva magazeno "Esperanto". La bakua /de urbo Baku/ urbestro petis instrukcion pri Esperantaj eldonoj. La Ĉefa administracio por presaferoj klarigis: ĉiuj eldonoj en fremdlingvoj, en tiu nombro en Esperanto, ... interne de la imperio subiĝas al la samaj reguloj, kiuj estas por la ruslingvaj, sekve oni povas eldoni kaj disvastigi ĉiujn eldonojn kiuj ne estas malaprobataj".¹⁴

Certe la cara registaro gardis siajn politikajn kaj ideologiajn interesojn. Programo kaj enhavo de eldonoj estis zorgeme kontrolataj. Tial la plejpartoj el programoj por Esperantaj eldonoj estis mallarĝa kaj nepolitika. Post la 1905. programoj de periodaj eldonoj plilarĝiĝis. Formale en programojn iufoje oni enigis literaturajn, historiajn, ekonomiajn, sciencajn, eĉ politikajn, naciajn, religiajn problemojn, kronikon de rusaj kaj eksterlandaj eventoj. Malgraŭ tio, punkto 29 de la Statuto de la Tomska Esperanta societo forigis artikolojn pri politikaj kaj religiaj problemoj.¹⁵

Kiel en praktiko ekzistas ebleco skribi pri akraj politikaj kaj ideologiaj problemoj, montras la sprita rakonto de A. Kofman en la "Ruslanda Esperantisto", 1910., n-ro 2-3, p.66-72. La ruslingva rakonto havas subskribon: "tradukis el Esperanto Vsevolod Lojko". Ni legas en la rakonto la

"anoncon": artikolojn pri politikaj, religiaj kaj aliaj disputemaj problemoj redakcio ne akceptas. La eldonisto klarigis kialon de tia situacio. Laŭ li necesas esti singardema, senpartia. Ekzemple: artikolo pri "malapero de kristanismo dum IV jarcento" ne taŭgas, ĉar la aŭtoro diras ke la kristanoj forgesis evangeliajn ideojn. Artikolo pri la estonta venko de proletaro super burĝaro estas nepermesebla. Artikolo pri perforto flanke de provosoj kontraŭ virinoj-revoluciulinoj estas malallasebla. Ne povas esti presita artikolo pri sakarino, ĉar ĝi tuŝas profiton de sukerouzinposedantoj. Rezulte ĉe eldonisto restas nur sensenca Esperanta verso "Mia koro kantas", sed ĝin ne akceptas legantoj. La eldonisto aŭdis riproĉojn, ke esperantistoj de lia epoko estas timemaj. Nur post 40 jaroj nova forta generacio venkos ĉiujn barojn. Tial la eldonisto decidis ekdormi por 40 jaroj!

Por garantii la kontrolon cenzuraj oficejoj enkondukis registradon de eldonaĵoj, aranĝis sliparon de Esperantaj gazetoj kaj libroj.¹⁶

En la 1908. la ĉefa administracio por presaferoj aranĝis "Ekspozicion de presaĵoj" /certe por interna ofica uzado/. Tiel estis nomita granda dosiero /"Fako de periodaj presaĵoj"/, kie estis surgluitaj ŝlipoj kun titoloj. Ili estis lokigitaj laŭ lingvoj, inter ili estis ankaŭ Esperanta fako.¹⁷

En la 1909. la Ĉefa administracio ricevis listojn de neperiodaj Esperantaj eldonoj de 8 cenzuraj oficejoj.¹⁸

Memkompreneble verkoj nedezirindaj por la carismo estis malpermesataj. Aŭtune de la 1905. estis malpermesita "Rahelo kaj Lio. Malgranda felietono" en n-ro 3-4 de la "Ruslanda esperantisto", p.4-5. La felietono komparis biblian rakonton pri Jakobo, kiu ricevis edzinon Lio, anstataŭ amata Rahelo, kun Ŝtata Dumo /parlamento/, kiun la popolo ricevis anstataŭ demokratian konstitucion. "Miljukov ekĝojis eĉ Lion", riĉuloj Bezobrazov kaj aliaj povas esti deputitoj, sed la aŭtoro de la felietono loĝejluanto Jablonov ne povas. Li krias "mi ne volas ĉirkaŭpreni Lion!".¹⁹

En la 1907. estis malpermesita por importi Rusion, eldonata en Parizo, la Esperanta gazeto "Internacia socia revuo". Ĝi havis socialisman karakteron, akre kritikis militarismon, rusan reakcian reĝimon. La rusan caron ĝi nomis "pacifista kanajlo", kiu tute ne estas pacifisto. Li dispelis Dumon, sangokovris Rusion, estas "rusa vampiro" ktp. Dum ĉiuj sekvintaj jaroj,

"Internacia socia revuo" ankaŭ estis malpermesita.²⁰

La cenzuristo Krivoŝ severe malpermesis la broŝuron "Nova gvidlibreto por soldato en ĉiuj landoj". Ĝin esperantigis Fi-Blan Go kaj Ludoviko, kaj eldonis la Asocio "Paco-Libereco". La broŝuro agitis kontraŭ milito, kontraŭ tirano - la rusa caro, kontraŭ ĉiuj registaroj kiuj subpremas popolojn. La cenzuro opiniis ke la "Nova gvidlibreto..." gvidas "al tre malutila direkto."²¹

En la 1908. estis malaprobata aldono al "Pola esperantisto" - libreto de V.S.Rejmond: "El la konstituciaj tagoj. Rememoroj". El la pola lingvo ĝin tradukis L.Zetel, Varsovio. Rejmond vigle priskribis eventojn kaj humorojn en Varsovio dum kelkaj tagoj antaŭ kaj post la manifesto de la 17-a de oktobro, kun strikoj, manifestacioj, pafekzekuto kontraŭ poloj flanke de la rusa militistaro. En la 1910. la aŭtoro Rejmond kaj la redaktoro de "Pola esperantisto" Lev Markusoviĉ Zamenhof estis submetitaj al tribunalo. La varsovia juĝistaro / "sudebnaja palata" / la 16.10.1910. decidis neniigi ĉiujn 500 ekzemplerojn de la libreto, kaj ĉiujn presaksesoraĵojn, kiuj estis preparitaj por presi ĝin.

Dum la 1915. en Usono denove estis eldonita la libro de V.Rejmond "Dum tagoj de la konstitucio". Pollingva usona ĵurnalo "Dziennik Ludovi" anoncis pri la eldono de la libro de Rejmond. Sur kovrilo de la libro estis desegnita kozako, kiu mortpikas polan unukapan aglon. Memkompreneble tiu eldono kaj la anonco estis malpermesitaj.²²

En la 1910. la cenzuro malpermesis la romanon de H.A.Lujken "Paŭlo Debenham", originale verkitan en Esperanto kaj eldonitan en Londono de la Brita Esperanto-Asocio. La posedanto de la Esperanta librejo A.A.Saĥarov klopodis pri revizio de la malpermeso. La cenzuristo Krivoŝ raportis, ke en la romano estas nomita "malfeliĉa lando" kun "malfeliĉa popolo" kaj estas dirite, ke la politika polico havas "specialan funkcion" esti "protektanto de la caro", ke ĝi uzas senhontajn kruelegajn rimedojn por riĉigi sin. Krivoŝ opinias ke post forigo de kelkaj paĝoj la libro povas esti permesita. Sed estro de la Centra komitato por eksterlanda cenzuro grafo A.N.Muravjev ordonis malpermesi la tutan libron.²³

En aprilo de la 1914. estis malpermesita la broŝuro de Vilhelm Vinŝ

"Pri la kredo al mirakloj /Natura klarigo de la bibliaj mirakloj/". El la germana lingvo tradukis P. Villiam, Dresden. La broŝuro ankaŭ raportis pri mirakloj en Evangelio kaj pri ekleziaj antaŭjuĝoj.²⁴

Dum la Unua mondmilito la cenzuristoj daŭre trarigardis Esperantajn eldonojn kaj ili nur postulis pligrandigi salajron pro multekosteco de la vivo. Krivoŝ forlasis la servon en la eksterlanda cenzuro. La nova cenzuristo Pukits ne konsentis cenzuradi la hungarajn kaj Esperantajn verkojn kontraŭ suplementa pago je 25 rubloj. Tiam la estraro ordonis fiksi novan necesan salajron.²⁵

Ni renkontas dum la militaj jaroj nur 3 malpermesojn de Esperantaj eldonoj. En la 1914. estis malpermesita la broŝuro "La vero pri la milito" - oficiala dokumentaro, esperantigita el la germana lingvo kaj eldonita de germanaj esperantistoj en Dresden. La broŝuro estis kunmetita el falsaj propagandaj materialoj de la germana registaro, ekzemple ĝi enhavis tronan paroladon de Vilhelm la Dua ktp.²⁶

En la 1915. estis malpermesita la kontraŭmilitarisma broŝuro de Isken-der "Civitanoj de l' mondo", Pitlochri, Skotlando. Ĝi turnis sin al veraj regantoj de la mondo, al laborantaj klasoj, kiuj devas ĉesigi subpremon de popoloj, nuligi la militarismon, La aŭtoro diris ke li estas nek socialisto, nek revoluciulo, nek anarkisto. Li alvokis al religia konscienco por ke popoloj plenumu "Dian pacan leĝon". Pri tia utopia broŝuro cenzuristo dubis: "ĉu estas permesebla pacifista propagando en tia formo?" Grafo Muravjev certe malpermesis la broŝuron.²⁷

Daŭrigante sian malnovan tendencon, la cenzuro en la 1916. malpermesis la broŝuron "Rimedo por konscia regulado de la infanonombro". Tio estis malsaĝa eklezia elpaŝo kontraŭ prevento de gravediĝo.²⁸

Krome raportoj de la eksterlanda cenzuro sciigis, ke en la 1914. estis permesitaj kun forigo de apartaj lokoj 8 Esperantaj verkoj kaj 1 en la 1915.

Malgranda nombro da malpermesitaj verkoj dankas al penoj de la plejparto de esperantistoj eviti akrajn politikajn, militajn kaj ideologiajn problemojn.

Kajeroj de multaj militaj cenzuristoj de la poŝta ofico, kiel antaŭ la mondmilito, tiel same dum la 1914. - 1917. jaroj, tralasadis Rusion Espe-

rantajn eldonaĵojn. Noto: "estas pura" signifas ke abonantoj povas ricevi signitan eldonaĵon. Eblas kalkuli 25 Esperantajn diverstitolajn eldonojn el multaj aliancaj kun Rusio aŭ neŭtralaj landoj, eĉ "Brazila esperantisto", kiuj estas permesitaj de la poŝta cenzuro.²⁹

La cenzuristo R.Bojly tralasis eĉ en la 1916. la pacifistan gazeton "Esperanto-numero", kun noto ke ĝiaj pacifistaj artikoloj enhavas "nenion kriman".³⁰

Svisa diplomata oficejo en la 1915. informis la rusan ministerion por eksterlandaj aferoj ke inter naciaj poŝtoj dum la milito restariĝis ligoj tra neŭtralaj landoj. La Universala Esperanto-Asocio en Ĝenevo eldonas gazeton, kiu informas pri helpo al militaj viktimoj, pri la Esperanta movado kaj ĝi ne tuŝas taskojn de militantaj ŝtatoj, ne havas militajn informojn, ne tuŝas politikajn problemojn. La oficejo demandis laŭ kiuj cenzuraj reguloj menciitan gazeton oni povas sendi al rusaj abonantoj. La prezidanto de la Ĉefa milita cenzuro generalo-leŭtenanto Zvonnikov petis klarigi al li pri cenzura ordo rilate Esperantajn eldonojn dum la milita tempo. La Ĉefa administracio por poŝto kaj telegrafo klarigis, ke la Esperantaj eldonojn oni devas trarigardi, kiel aliajn eksterlandajn - nenian aliajn formalizaĵojn oni postulas.³¹

Post la februara revolucio en la 1917. ekestis granda libero por presaĵoj. La 17.3.1917. la milita cenzuro ricevis direktivon de la Provizora registaro, ke ĝi devas trarigardi sendaĵojn nur deekstere. Tio signifas rigardi: ĉu sendaĵoj havas iujn sekretajn aldonojn, subskribojn ktp., sed la cenzuro ne devas kontroli la malfermitan enhavon de verkoj.³²

Resumante la agadon de la cara cenzuro, oni povas konstati, ke la cara cenzuro antaŭ la 1905. suspekteme, malamike, renkontis aperon de Esperantaj eldonoj, parte ĝi permesis sed ofte malpermesis ilin, sub falsaj pretekstoj. Dank'al la Unua rusa revolucio en la 1905. la cara cenzuro estis devigita plilarĝigi eblon presi en Rusio kaj ricevi eksterlandajn Esperantajn eldonojn, kies kvanto kreskis dum la komenco de XX jarcento. Sed suspektema rilato al la internacia lingvo, konstanta sufiĉe rigora kontrolo restis, ĉar la cara cenzuro subpremis ĉiujn verkojn, konforme al sia despota, reakcia socia karaktero. Nur dum la revolucio de la 1917. esperantlingvaj presaĵoj fariĝis plenrajtaj kun alilingvaj.

Notoj pri la dokumentoj:

/Pri signifoj de la mallongigoj bonvolu konsulti la unuan parton de la artikolo - n-ro 1-2 de la sama volumo, sur la paĝo 46./

1. D.776, r.8, d.1832, j.1904, l.1-43; H.19.
2. H.19, 28.
3. Alfabetaj listoj de X.1904. ĝis XII.1916; D.779, r.2, ĉiujaraj raportoj pri agado de eksterlanda cenzuro por 1904-1915; D.1289, r.21, d.395, j.1904.
4. D.776, r.30, d.44, 46, j.1905; d.78, j.1905-1916; d.62, 66, 67, 70, 71, j.1909; D.777, r.5, d.187, j.1904; r.25, d.973, j.1909.
5. D.776, r.8, d.1893, j.1904.
6. D.776, r.8, d.1902, j.1904; D.777, r.5, d.231, j.1904, l.1-3.
7. Plena kolekto de leĝoj. Leĝo de la 24.11.1905.
8. D.776, r.16 parto unua, d.1555 kaj 1948, j.1908.
9. D.776, r.9, d.2127, j.1910.
10. D.776, r.21 parto dua, d.71, j.1912.
11. D.776, r.21 parto dua, d.218, j.1914.
12. D.776, r.10, d.2271, j.1916.
13. D.776, r.17, d.249, j.1913.
14. D.776, r.22, d.280, j.1912.
15. D.776, r.21 parto dua, d.218, j.1914, l.4.
16. D.776, r.30, d.44, 46, 78; r.31, d.30, 91.
17. D.776, r.31, d.97, j.1908, p.105, 170, 207.
18. D.776, r.30, d.58, 59, 62, 64, 66, 67, 70, 71, j.1909.
19. D.777, r.5, d.231, j.1904, l.7.
20. D.1289, r.21, d.218, i.1907, l.94-105.
21. D.779, r.2, d.8, j.1907, l.15; r.4, d.311, j.1909, l.192, 200.
22. D.776, r.30, d.55, j.1906, l.15, 71; r.22, d.61, j.1910.
23. D.779, r.2, d.5, j.1912, l.41-42; r.4, d.320, j.1912, l.337, 345.
24. D.779, r.4, d.327, j.1914, l.80.
25. D.779, r.3, d.3, j.1916.
26. D.779, r.4, d.328, j.1914, l.530, 539.
27. D.779, r.4, d.231, j.1915.
28. D.779, r.4, d.332, j.1916, l.420.
29. D.1289, r.21, d.306, 321, 322, 325, 332, 350-355, 357-361, 381, 387, 388, 390, 391, 395.
30. D.1289, r.21, d.332, j.1916, l.40.
31. D.1289, r.21, d.277, j.1915.
32. D.1289, r.21, d.332, j.1916, l.88-89.